

# esperanto sub \_\_\_\_\_ **LA SUDA KRUCO**

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

marto-aprilo 2007 • numero 86 | volumo 15 - numero 2



Jokohamo, urbo de la Universala Kongreso de Esperanto  
aŭgusto 2007

ISSN 1039-9380

esperanto sub

# LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIJO

N<sup>o</sup> 86 • Vol 15.2 • Marto-aprilo 2007

**Redaktoro:** Donald Broadribb

## ELDONADO

Ĉi tiu numero estis kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per komputilo iMac, uzante la programon Mellel, kaj la tiparojn Futura, Onyx kaj New Century Schoolbook.

## ABONOJ & PASINTAJ NUMEROJ

Abono kostas Aŭ\$40. Pagu al Libro-servo de AEA, 143 Lawson St., Redfern NSW 2016 • Aŭstralio.

[libroservo@esperanto.org.au](mailto:libroservo@esperanto.org.au)

Por membroj ekstraj ekzempleroj de *Esperanto sub la suda kruco* kostas \$A3.00 + poŝtsendokosto.

Pasintaj numeroj ankaŭ surrete elŝuteblas ĉe:

<http://www.esperanto.org.au/>

*Esperanto sub La Suda Kruco* estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj sur paĝo 31 de ĉi tiu eldono.

## *Esperanto Sub La Suda Kruco*

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

☎(08)96411937 • 📠(08)96411134

[esk@esperanto.org.au](mailto:esk@esperanto.org.au)

Pri opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

© 2006, AEA & NZEA — ĉiuj rajtoj rezervitaj.

La grafikan aspekton de la formato de *Esperanto sub la Suda Kruco* deparis Igor de Oliveira Couto.


## En Ĉi Tiu Numero

Nova romano de Trevor Steele (recenzas [db]).....	3
Recenzo pri <i>En la serĉado de la mondo-lingvo</i> (recenzas [db]).....	5
Recenzo pri <i>Mi estas homo</i> de L.L. Zamenhof (recenzas [db]).....	7
Atentigo pri <i>Born on a Blue Day</i> (informas Nicole Else).....	8
Fotoj el la Somerlernejo .....	9
Foto de la Torki Esperanto Kafo-klubo .....	9
Dalai-lamao disdonis <i>Tinĉjon</i> en Esperanto .....	10
Estraro de AEA 2007.....	10
Konu viajn kungesamideanojn: Annie Gleeson (Katja Steele) .....	11
El la regionoj: Zamenhof-festoj en Melburno kaj Perto).....	12
Interrete:.....	13
Atentu viajn respondojn; Japana Esperanto-Instituto peras korespondadon; SBS pri Esperanto	
Skribas la legantoj:.....	16
Donald Rogers, Geraldo Mattos, Hugh Malcolm, Erhard Claus, Alan Turvey	
Raporto de la komisiito por Kursaroj 2006.....	17
Nekrologo: René Smeets (Vera Payne).....	18
Grandageco (poemo de Gaye Phillips) .....	19
Nova esperanta poŝtmarko el Israelo .....	19
Raporto de la kaskontrolisto.....	21
Protokolo de la Jarkunveno 2007 (Miranda Lutz).....	23

## Atentu!

*Ŝanĝo de limdato*

**La limdato por *ESK* majo-junio estas la 5a de aprilo.**



## NOVA ROMANO DE TREVOR STEELE

**Trevor Steele:** *Kaj staros tre alte.* Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo, 2006. 293p., broŝurita. Prezo: \$30. Mendu rekte de Trevor Steele, 9 Vicar Street, Gilles Plains SA 5086, Aŭstralio.

### Recenzas via redaktoro

Takso: 🍷🍷🍷🍷

Ĉi tiu romano estas tre malsimila al la antaŭaj romanoj de Trevor Steele, kvankam ĝi dividas kun ili unu karakterizaĵon: ili rekonstruas por ni la vivojn kaj spertojn de personoj, kiuj estis ĉe la centro de por ili io grava. Sed ĝis nun, la romanoj de Trevor Steele temis pri relative modernepokaj homoj (ekz. en *Sed nur fragmento*, *Neniu ajn papilio*, *La fotoalbumo*). Ĉifoje temas pri homo vivinta antaŭ dumil jaroj.

Ĉar biografioj de Jesuo abundas jam de multaj jaroj, ne nur en la naciaj lingvoj sed eĉ kelkaj en nia lingvo, la temo ja ne estas unika. Sed la pritrakto de la vivo de Jesuo en *Kaj staros tre alte* estas vere

unika. Por Steele, Jesuo estis junulo, kies ideoj kaj planoj evoluadis dum lia ĉ. tridekjara vivo.

La pensobildo de Trevor Steele pri Jesuo, montras al ni personon, kiu jam kiel juna infano vidis aŭreolojn<sup>1</sup> ĉirkaŭ personoj. Iom post iom, dum la infano kreskas, li spertiĝe lernas kompreni la signifojn de la diversaj koloroj, ilia pozicio, kaj

<sup>1</sup>. Laŭ *NPIV (Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto)*, aŭreolo estas "Luma radiado ĉirkaŭ la figuro de sanktuloj". Sed pli ĝenerale, laŭ ordinara vortuzo, aŭreolo estas lumantaj koloroj ĉirkaŭ ĉiu persono. Tiuj koloroj indikas la sanon kaj karakteron de la koncerna persono. Laŭteorie povus vidi aŭreolojn ĉiu ajn; en la praktiko, nur kelkaj homoj vidas ilin.

manko/nemanko. Per tio la juna Jesuo kapablas diagnozi la sanon kaj emocian staton de iu ajn individuo. Dum kelkaj jaroj la kapablo vidi aŭreolojn ekforlasas Jesuon, sed kelkajn jarojn poste tiu kapablo reaperas.

Jesuo renkontas ermitecan viron, kiu iom longe loĝis kaj studis en Hindio, kaj kiu klarigas al Jesuo gravan lernajon:

Unue, ke en ĉiu persono troviĝas “la Dio”, kaj kuraciĝo okazas, kiam tiu persono kontaktas kaj permesas la agojn de tiu interna “la Dio”.<sup>1</sup> Kuraco venas nur el la interno de la malsanulo. Neniu homo kuracas alian homon; sed oni ja povas helpi alian homon trovi kaj kontakti la internan Dion. Kaj oni povas pruntsendi kolorojn el onia propra aŭreolo al la malsanulo, por helpi pliĝustigi ties aŭreolon kaj konsekvence la sanon. Sur tiu fundamento Jesuo komencas kompreni la arton kuraci malsanulojn.

Jesuo ankaŭ lernas ke oni ne rigardu eksteren, por trovi ian Dion en la ĉielo; kaj oni ne supozu ke nur unu religio estas prava. En ĉiu homo, negrave kie kaj kiam, troviĝas la interna Dio.<sup>2</sup>

Dua ĉefinfluo estis la juda mesi-

<sup>1</sup> En hinda instruo, oni nomas tiun internan Dion “atmano”. Analogaj konceptoj troviĝas en multaj aliaj religioj kaj filozofioj.

<sup>2</sup> La romano nomas ĉi tiun koncepton “universalisma”. La koncepton mem oni trovas en la Biblio: ekzemple, en la teksto de la Evangelio laŭ Johano, versoj 1:9: “Ĝi estis la lumo de vero, kiu lumigas ĉiun homon estiĝantan en la mondo”. [Mia traduko el la greka — [d]]

ismo tiuepoka. Laŭ tiamaj interpretoj de la sanktaj skribaĵoj, tre baldaŭ la mondo finiĝos. Tio okazos kunlige kun la Mesio, ia supernaturulo kiu enkondukos la regnon de Dio. Detaloj variis inter diversaj judaj skoloj, kaj neniel ĉiuj judoj estis mesiismaj. Sed la patro de Jesuo estis tre pia kaj ortodoksa, tiom ke unue Jesuo supozis ke lia patro mem estas/estos la Mesio. Post la morto de la patro, Jesuo emis supozoj diversajn aliajn personojn la Mesio. Nur iom malfrue li konvinkiĝis (eble grandaparte pro instigoj fare de liaj konatoj) ke li mem estas la Mesio. Lia agado kaj lia karaktero profunde ŝanĝiĝis. Li plu kuracas, sed anstataŭ emfazi la “Dion internan”, li komencas emfazi la ne nur internan “regnon de Dio” kaj la baldaŭan finon de la konkreta mondo.

Kiam la laŭsupoze profetitaj eventoj ne okazas, li decidas ke li devas “helpi” Dion, per okazigo de tiuj eventoj. Ĉar la judaj kaj la romiaj regionestroj ne sin koncernas pri li, li devas mem kaŭzi sian arestiĝon, kaj ekzekutiĝon. Tamen, nek la mondogo, nek la regno de Dio estiĝas.

Kiel ĉiam, en la romanoj de Trevor Steele, elstaras la karakterizado de la rolantoj. Ne nur Jesuo, sed ankaŭ la multaj aliaj personoj en la rakonto fariĝas intime konataj de ni. Ni vidas la internajn kaj eksterajn realojn tra iliaj okuloj, ili fariĝas veraj homoj, ne nur priskribaĵoj por antaŭenigi la rakonton. Pro tio, la romano pleniĝas per sia propra vivo.

Nu, verŝajne, tradiciaj kristanoj

ne plezure legos la romanon; ankaŭ ne ateistoj. Ankaŭ ne alipensuloj. Verŝajne. Sed...ebleble jes.


Mi mem entuziasmoplene legis la romanon; ne gravas ĉu mi jes aŭ ne akordas kun ĉiuj vidpunktoj en

ĝi, aŭ eĉ kun nur unu vidpunkto en ĝi. Kiel literaturaĵo, ĝi estas grava verko. Kaj se, dume, oni renkontas novajn pensojn, ĉu onin tio damaĝas? □

.....



## • Recenzas via redaktoro



**Aleksandr Duliĉenko:** *En la serĉado de la mondolingvo, aŭ interlingvistiko por ĉiuj*. Kaliningrado: Sezonoj, 2006. 159p., broŝ.

Takso: 🍷🍷🍷

Tre bone verkita libro pri la historio de la provoj solvi la lingvoproblemon, ekde la plej fruaj jaroj ĝis la nuntempo. Oni komencas per la iama teorio ke ekzistis origine nur unu lingvo (la “antaŭ-Turo-de-Babelo-teorio”), kaj provi trovi kiu el la ekzistantaj lingvoj estis la praulo de ĉiuj lingvoj.

Sekvas ĉapitroj pri la interago de socio kaj lingvo: kiel la socio influas la lingvuzadon? Kaj post tio, la

unua provo *krei* lingvon, jam en la dua jarcento!

Dum multaj jarcentoj, aro da personoj strebis krei filozofie bazitan lingvon, en kiu ĉiu sono havas specialan signifon, tiel ke oni progresas, ekzemple, de  $a = universo$ , al  $ab = tero$ , al  $abc = besto$ , al  $abcd = homo$ , al  $abcde = viro$ , kc. Komprenible, ĉiu el la lingvokreintoj havis propran vidpunkton pri la signifo kaj karaktero de la sonoj, kiel aldoni ekstrajn signojn por specialaj ideoj, kc. Interesa intelekta ludo, sed apenaŭ praktika!

Onin interesis la uzado de bildetoj, aŭ de signoj bazitaj sur bildetoj, kiel en la ĉina lingvo: eble oni povus konstrui novan skriban lingvon, en kiu ĉiu signo indikus specifajn, kaj (simile al la ĉina) ĉiu persono en la mondo povus legi la signajn tekstojn kaj kompreni ilin, kvankam prononcante ilin laŭ sia hejma lingvo! Bela teorio, sed oni bezonus centmilojn da apartaj bildetoj aŭ signoj. Kiom povas la homa memoro mastri?

De tiu punkto al nova koncepto: konstrui lingvon el nelongaj vortoj, eble prenitaj el jam ekzistantaj lingvoj, kun racia gramatiko.

Ĉi tiajn lingvoprojektojn oni no-

mas “aprioraj”: oni komencas per plano, kaj arbitre konstruas lingvon por plenumi la planon. Tiaj projektoj abundis ĝis la mezo de la 1800-oj, kaj ankoraŭ nun preskaŭ ĉiujare aperas nova projekto tia, ie en la mondo.

Kontraste, “aposteriora” lingvoprojekto signifus bazi konstruotajn lingvon sur la jam ekzistantaj etnaj lingvoj. En la 1880-oj ekfuroris Volapük, nove konstruita lingvo kies vortoj estis formitaj el etnaj vortoj [vol el la angla vorto *world*, kaj *pük* el la angla vorto *speech*], plus afiksoj por indiki gramatikaĵojn. La deziro uzi nur sonojn familiarajn al ĉiuj homoj necesigis deformigi la vortojn, tiel ke rezultis lingvo kun stranga aspekto, sed plene uzebla. Plurmil personoj lernis paroli kaj skribi Volapukon, oni presis revuojn kaj librojn en Volapuko, eĉ okazis kongresojn volapukajn. Sed entuziasmo ekmalfortiĝis, kaj post ± 20 jaroj nur malmultaj personoj plu interesiĝis pri ĝi.

Kial? La aŭtoro de la libro ne prezentas propran vidpunkton pri tio, sed mi opinias ke la kaŭzo estis socia. Volapuko originis en Germanio, kaj populariĝis en Eŭropo; tiuepoke eŭropanoj emis kredi ke la “mondo” = Eŭropo; konsekvence, supozis la eŭropanoj ke monda lingvo nepre devas esti eŭropeca lingvo, do kial deformi eŭrop-devenajn vortojn? Konsekvence, diversaj volapukistoj populariĝis la ideon ke dezirindas anstataŭigi la volapukajn vortojn per “naturaj” vortoj. t.e. vortoj similaj al aŭ rekte prenita el la etnaj lingvoj de Eŭropo. Ke al personoj ne konantaj eŭropan lingvon (do

eble  $\frac{3}{4}$  de la mondo) *vol* kaj *mond* estas egale akcepteblaj, oni ne atentis. La eŭropa vidpunkto daŭras eĉ nun: ke por ke monda lingvo estu facile lernebla, ĝi devas aspekti kaj soni simila al eŭropaj lingvoj. Facila — kompreneble — por Eŭropanoj!

En 1887 ekaperis Esperanto, kies proponinto bazis la vortaron sur eŭropaj radikoj: al eŭropanoj *mond* aspektis multe pli “natura” ol *vol*; *parol* ol *pük*.

Esperanto tute ne estis la sola nove inventita lingvo kun tia karaktero. Sed ĝi aperis ĝustamomente, kaj multaj volapukistoj transiris al ĝi.

Sed nun komenciĝis ankoraŭ nova etapo en la mondlingva ideo: kial ne uzi jam ekzistantan lingvon, ekzemple ĝisdatigitan Latinon? Aŭ simpligitan anglan, aŭ francan? Bona ekzemplo estis *Latino sine fleksione*, latinaj vortoj sen la gramatikaj komplikajoj de Latino. Simpligita angla lingvo estis *Basic English*, anglalingvaj vortoj kaj anglalingva gramatiko, sed multe malpli granda vortaro.

Nuntempe multegaj personoj opinias ke la angla lingvo tiom disvastiĝas, ke ĝi fariĝas mondlingvo sen modifi ĝin kaj sen la neceso fari movadon por subteni ĝin.

En sia libro Duliĉenko ekzamenas ĉion ĉi kaj multon plian. Li donas ekzemplojn de tipaj lingvoproponoj dum la jarcentoj. Li klare verkas. Erudicia la libro ne estas; la nespecialistan leganton li celas. Do por personoj kiuj scivolas pri la evoluo de la ideo pri mondlingvo, la libro tre taŭgas. □



## • Recenzas via redaktoro

**L. L. Zamenhof:** *Mi estas homo*. Kaliningrado: Sezonoj, 2006. (Serio *Scio* vol.6). 287p.

Takso: 🍌🍌🍌🍌

Esperantistoj ĝenerale scias ke Zamenhof ne nur kreis Esperanton, sed ke lin interesis ankaŭ religia reformo, kiun li nomis “Hilelismo” (li poste ŝanĝis tiun nomon al “Homaranismo”). Sed ĝuste kion li celis, kaj kial?

Kion, efektive, Zamenhof konsideris kiel sian propran religion? Ĉi tiu libro, kiu konsistas el kolekto de liaj verkoj speciale pri religio, konigos al vi tiun plejparte nekonatan parton de lia menso. Ĉar Zamenhof strebis apartigi siajn du projektojn Esperanto kaj Hilelismo, multaj el ĉi tiuj dokumentoj ĝis nun estis kvaŝaŭ kaŝitaj en obskuraj eldonaĵoj, ofte neesperantaj.

Zamenhof naskiĝis en urbo kiu estas nuntempe pola, sed tiutempe estis rusa. La lingvo parolata en la hejmo estis la rusa. Kvankam li estis oficiale “hebreo” (=judo), li diras ke lia patro estis ateisto; kaj kvankam li mem kredis je Dio kaj je la postmorta vivo, li nek praktikis nek interesiĝis pri la judaj doktrinoj kaj ritoj.

Ĉar Zamenhof loĝis en tiu hebreopola/rusa medio dum sia tuta vivo, li supozis la kondiĉojn tie pli-malpli tutmondaj. Li estis oficiale klasifika kiel “el la Hebrea gento”, laŭ la rusa leĝaro, kaj lin mizerigis ke li ne estis rigardata kiel ordinara homo sed kiel membro de speciala

“gento”.

Li estis plene konvinkita ke la kaŭzo de ĉiuj militoj kaj interpopolaj disputoj estas la konfliktoj inter religioj kaj inter lingvoj. Dum preskaŭ sia tuta vivo li intencis ke tiuj du projektoj: lingvoreformo kaj religireformo iru man-en-mane.

Komence, li volis radikale reformi judismon: purigi el ĝi ĉiujn historiajn mitojn kaj legendojn kaj ritojn (li opiniis ilin nelegitimaj kreaĵoj de homoj.) La sola “dogmo” de lia reformita religio estis “agu kun aliaj, kiel vi volas, ke oni agu kun vi”.

Dum sia fazo de judismo-reformo li konceptis ke judoj devos havi por si propran ŝtaton, teritorion, kie la Hilelismo estos la esenca religio. La lingvo de Hilelismo estos Esperanto. Li favoris pli-malpli vakan lokon en Usono, kie oni povus fondi tiun ŝtaton, simile kiel fondis la Mormonoj sian propran ŝtaton Utah.

Post kelkaj jaroj li konvinkiĝis ke la mondo ne emas al sendoktrina religio. Sekvis fazo dum kiu li proponis ke Hilelistoj povu, laŭvole, ankaŭ konservi tradiciojn kaj ritojn judajn.

Baldaŭ li ekkonsciis ke lia propono ne rilatas nur judojn, sed validas por ĉiuj homoj. Li renomis sian reformon “Homaranismo”. Iom post iom li ellaboris aron da “dogmoj” de Homaranismo: ke Homaranismano kredas je Dio (sed rezervas por si mem konceptojn pri kia kaj kio estas Dio), akceptas kiel solan prin-

cipon “agu kun aliaj, kiel vi volas, ke oni agu kun vi”. Estu templo en neŭtrala loko (eble Svisio), kie oni establos diversajn “homaranismajn” ritojn kaj kutimojn. Esperanto estu la lingvo.

Diverstempe Zamenhof proponis ke la Hilelismo/Homaranismo celu precipe personojn kiaj li mem, kiuj malakceptas ĉiujn jam establitajn religiojn. Alitempe li ripetis pli fruan sian ideon ke Homaranismo-rano rajtu konservi siajn tradiciajn religion kaj ritojn, ankaŭ lingvo(j)n,

sed nur por si mem, kaj akceptu ke oni ne rajtas postuli tiujn homfaritaĵojn por ankaŭ aliaj personoj.

Interesas ke Zamenhof supozis ke religio estas hereda; ke, ĝenerale, oni ne povas ŝanĝi sian religion. Simile, idoj de Homaranismo-rano aŭtomate heredos Homaranismo-ran kiel sian religion.

Por personoj dezirantaj koni la homon Zamenhof, kaj liajn pensojn, mi forte rekomendas ĉi tiun libron. □

.....

## Atentigas Nicole Else

Ĉu vi ĉiuj ricevis interesajn kristnaskajn donacojn? Mi ricevis libron kun la titolo *Born on a Blue Day*. Temas pri autobiografio de brita esperanto-parolanto Daniel Tammet.

Aŭstralianoj eble konatiĝis kun Daniel Tammet en septembro se ili rigardis ĉe ABC-televido la elsendon en la serio *Catalyst* nomita “Wonders of the Brain”. Daniel mirinde bone kapablas mense kalkuli. Multaj el ni memoras *pi* kiel 3.14, sed Daniel atingis eŭropan rekordon kiam li sukcesis diri pi kun 22514 decimaloj. Li bezonis pli ol 5 horojn por eldiri *pi* kun tiom da decimaloj! Sed li ne nur interesiĝas pri matematiko, sed ankaŭ pri lingvoj. En Vikipedio ekzemple ni trovas ke Esperanto estas unu el la multaj lingvoj kiujn li parolas. Antaŭ iom da tempo mi mem sendis al li mesaĝon en Esperanto kaj ja ricevis respondon en Esperanto. Dum la televid-

programo ni vidis eksperimenton en kiu Daniel devis provi lerni lingvon en unu semajno. Li ne mem rajtis elekti kiun lingvon. Tiuj kiuj faris la eksperimenton decidis, ke tiu lingvo estu la islanda. Temas pri lingvo malofte studata ekster Islando kaj ĝi estas malfacila lingvo. Dank’ al tre bona memoro Daniel sukcesis konversacii en la islanda post nur semajno da studado. Kompreneble Daniel estas escepto, plejmultaj personoj tute ne sukcesus tion fari. En lia libro *Born on a Blue Day*, la priskribo de Esperanto okupas preskŭ 2 paĝojn. Li skribas inter alie “I very quickly esperantiĝis (became a speaker of Esperanto) from reading various online texts in the language and from writing to other Esperanto speakers from all over the world”.

Se mi havos tempon mi provos skribi iom pli longe kiam mi estos finĝinta la libron. □



## Fotoj el la Somerlernejo en Hobarto Januaro 2007



Fotoj el la blogo de Robert Budzul

## De la Torki Esperanto Kafo-Klubo (fotis Andrew Lutz)



Staras: Melissa, Sandor, Richard, John, Rainer, Elrae, Ruth, Ian, Paul, Luke, Jenny, Andrew. Sidas sur la herbo: Miranda, Emma, Carol, Luke, kaj nia hundoj "Charlie" kaj "Angel".

## Dalai-lamao disdonis Tinĉjon en Esperanto

Dalai-lamao, la spirita gvidanto de multaj tibetaj budhanoj, ĉi-jare transdonis la premion “Lumo de vero” al fondajo Hergé pro la bildstria verko *Tinĉjo en Tibeto*. Lige kun la ceremonio, oni disdonis al la ĉeestantoj ekzemplerojn de la esperantlingva eldono de la verko. Esperantistoj ŝajne ne ĉeestis dum la ceremonio, sed laŭ neesperantista ĉeestinto, la esperanta versio estis disdonita “kun la espero, ke iam ni ĉiuj parolos la saman lingvon”. La premio “Lumo de vero” estas disdonata ĉiujare de la Internacia Kampanjo por Tibeto. Ĝin ricevas personoj kaj institucioj, kiuj faris “signifajn kontribuojn al la tibeta batalo por homaj rajtoj kaj libereco”.

Ĉi-jare estis du premiitoj. Sudafrika ĉefepiskopo Desmond Tutu, kiu ricevis la distingon pro sia strebado por fortigi la rajtojn de subprematoj, kaj pro sia klara subteno al la rajtoj de tibetanoj. Ankaŭ premiita ĉi-jare estis la fondajo Hergé, pro sia subteno al la heredaĵo de la forpasinta aŭtoro de *Tinĉjo en Tibeto*, Georges Remi (alinome Hergé). *Tinĉjo en Tibeto* estas unu el la plej popularaj verkoj en la mondfama serio de bildstrioj pri la knabeca ĵurnalisto. La libro rakontas pri la amik-

eco inter Tinĉjo kaj la tibeta knabo Chang, kiu travivis flugakcidenton en la montaro. Kiam Tinĉjo venas savi sian amikon, li renkontas tibetajn monaĥojn kaj la mitan neĝoviron.

La premio, en formo de tibeta buter-lanterno, estis akceptita de la vidvino de Hergé, Fanny Rodwell. Grava kialo de la premiado estis la sinteno de Hergé en rilatoj kun ĉina eldonisto de *Tinĉjo*. Kiam la verko aperis ĉinlingve, ĝi estis nomita *Tinĉjo en ĉina Tibeto*. Hergé kaj lia eldonejo protestis, kaj la ĉina flanko konsentis aperigi la verkon kun la origina titolo.

Ne nur dum la ceremonio oni disdonis ekzemplerojn de la verko al la ĉeestantoj, ankaŭ ekster la salono haveblis senpagaj Tinĉjo-libroj. Sed nur en Esperanto.

La premia ceremonio okazis en Bruselo jam en junio, kaj pri ĝi raportis multaj mondaj amaskomunikiloj. Tamen ĝis nun ne estis vaste konate inter esperantistoj, ke oni specife elektis ĝuste la esperantlingvan eldonon por disdonado. La esperanta eldono de *Tinĉjo en Tibeto* aperis ĉe la eldonejo Casterman en 2005. □

## Estraro de AEA 2007

Prezidanto: Igor de Olivera Couto  
 Vicprezidanto 1: Penelope Vos  
 Viceprezidanto 2: John Abood  
 Sekretario: Miranda Lutz

Vicsekretario: Gordon Coleman  
 Kasisto: Stephen Pitney  
 Vickasisto: Jennifer Bishop □



## • Konu viajn kungesamideanojn

### Biografio de Annie Gleeson

Intervjuita de Katja Steele

Annie naskiĝis en Kimrujo, en ĝia ĉefurbo Cardiff.

Ŝia patro mortis antaŭ 10 jaroj, sed ŝia patrino Cath vivas kaj loĝas en Adelajdo. Annie estas la plej aĝa el la 4 gefratoj, ŝi havas du fratojn (Kevin kaj John) kaj 1 fratino (Elle). La familio migris al Aŭstralio precipe por trovi pli varman klimaton ol estis en la hejmlando.



Ĉar la familio estis katolika, Annie ekstudis en la lernejo de Sankta Dominiko. Sekvis 2 studjaroj en Sidnejo kaj 3 en la universitato de Kanbero (1971-73) studante matematikon, sociologion, ekologion kaj la anglan. Intertempe, kiam 18-jara, Annie iĝis monaĥino kaj post la studado ŝi eklaboris kiel instruistino en la sama lernejo, kie ŝi mem lernis, en Sankta Dominiko (restis tie 7 jarojn). Tiu laboro estis malfacila. “Tiam mi pensis, ke mi ne ŝatas instrui, sed nun mi scias, ke ne estis saĝe labori plentempe. En tiu parto de mia vivo mi estis tre laca.”



Annie restis monaĥino 14 jarojn (1969-83). Eĉ se ŝiaj valoroj ne ŝanĝiĝis, la mondpercepto jes.

En la sekva vivperiodo ŝi estis memsufiĉa ĝardenisto.

Kun amiko Simon kaj amanto

John ŝi kreis “Pacĝardenon”, en kiu ili kreskigis legomojn kaj fruktojn, kaj bredis abelojn. Ili havis eĉ propran tritikon, kiun ili mem muelis, kaj propran olivoleon.

Kiam 36-jara ŝi renkontis Ashley-n, kun kiu ŝi feliĉe kunvivas ĝis nun en la hejmo “Seli-Hoo”. Ĉar temas pri komunuma domo, Annie kunvivas ankaŭ kun Helen kaj Sandor kaj parttempe kun plia kvindeko da samideaj homoj. Tamen, Ash kaj Annie havas sian privatan dormoĉambron, konstruitan propramane el adobo. Ili decidis ne havi infanon. “Mi diris al mia amikino Mel: “Mi ne havos infanojn, sed eble mi helpos zorgi pri la infanoj de aliaj”. Kiam poste Mel gravediĝis, Annie iris kun ŝi al antaŭnaskaj lecionoj kaj poste helpis ĉe la nasko de Acacia. Annie kaj Ashley helpis ankaŭ en la edukado de la filino de Sandor kaj de Angeli, la filino de Elle, la fratino de Annie.

Malfacilaj estis tiuj 6 jaroj, kiam Annie suferis je kronika laceco. Du jarojn ŝi pasigis pli-malpli enlitate.

“Mi pensas ke homoj, precipe amikoj, estas en la centro de mia vivo. En Kanbero mi renkontis Fran-on, monaĥinon, kiu iĝis unu el miaj plej proksimaj amikoj. Alia tia persono estas Jenny, kiun mi renkontis en virina spirita tendaro kaj kun kiu mi poste kunlaboris, kunmuzikis, loĝis kune...”

Kvar jarojn daŭris la periodo,

kiam Annie loĝis alterne po unu semajno en Adelajdo kaj en la kamp-ara domo en Marble Hill. Rekom-pence ŝi, Ashley kaj Helen helpis la posedantojn de la uzataj tero kaj do-mo.

Annie nun instruas ekologion, matematikon kaj verkadon en TAFE. “Nun mi laboras parttempe. Mi instruas virinojn kaj tre ŝatas

mian laboron.”

Je la demando, kial ŝi lernis Es-peranton, ŝi respondis: “Ĉar miaj amikoj ŝatas ĝin. La esperantistoj estas interesaj homoj.”

Annie deziras al si mem bonan sanon kaj longan vivon kun Ashley. Ĉar ŝi verkas, la bela revo estas gajni premion pro literatura verko. Estu tiel, Annie! □

.....



## • El la regionoj

### ***Viktorio festas la Zamenhof-Feston: Raportas Franciska Toubale***

Por festi la naskiĝon de la inici-atinto de Esperanto la 16an de decembro, en la malfrua posttag-mezo kaj vespero, kuniĝis en la bi-blioteko de la nordo de Carlton en Melburno esperantistoj de la di-versaj grupoj de Viktorio: la Melbu-rna Esperanto-Asocio, la Melburnaj Esperanto-Lernantoj, la Torki Kafo-Klubo, la Monash-Grupo, kelkaj izo-laj membroj kaj eĉ unufoje la patro de la sekretario de AEA, Miranda Lutz, kvankam li tute ne scias la lingvon (eble li intencas ĝin lerni. Gratulon al li).

Ĉiu kunportis pladon por dividi kun la aliaj ĉeestantoj. Du grandaj tabloj rapide kovriĝis per diversaj frandaĵoj salumitaj aŭ sukerumitaj.

Ne eblas pensi pri naskiĝo sen pensi pri kuko, do Betty Broadbent bakis kukon, ormanitan per verdaj steloj.

La distra vespero komenciĝis per la gastparolado de Sandor Monos-tori, kiu nun loĝas en Bendigo. En Hungarujo, almenaŭ dum la komu-nisma epoko, ĉiu hungaro sciis pri

la ekzisto de Esperanto. Li esper-antistiĝis por plezurigi amikinin, kvankam li ne estis tre konvinkita pri la utilo de tiu lingvo, sed tre bal-daŭ li uzis ĝin por vojaĝi tra Eŭ-ropo, eĉ ĉeestis Universalan Kon-greson, kie li amikiĝis kun tiamaj komencantoj, kiuj daŭre estas en kontakto kun li.

Sekve, la Melburnaj Esperanto-Lernantoj prezentis scenon en memserva restoracio, unue emfaz-ante la malamikecan etoson kre-atan de naciismo, due montrante kiel Esperanto instigas tute alian respondon al la sama incidento.

La legado de fabelo “La gorilo kaj la kolomboj”, laŭ kiu “iuj kurac-rimedo malbonas pli ol eĉ la mal-sanoj” iom pensigis la aŭskultant-ojn.

Teatraĵeto “La eminenta Espe-ranto-klubo”, farso, kiu prezentas karikaturon de fantazia Esperanto-klubo, multe ridigis kelkajn el la spektantoj.

Poste “La homlupoj”, ludo, kiu furoras en la esperantistaj rondoj de

Eŭropo, ebligis la ludantojn argumenti, voĉdoni por savi sian vivon.

La kunveno gaje finiĝis per komuna kantado kun Alan Bishop je la piano.

### ***Okcidentaŭstralio festas la Zamenhof-feston: raportas Debra McCarney***

Je la 10a de decembro pluraj okcident-aŭstralianoj kunvenis ĉe la domo de Joan Eddington por festi la Zamenhofan Feston. Ĉeestis 14 personoj entute, inkluzive de unu komencanto kiu kontaktis nin pere de la retpaĝaro. Julian estas juna advokato kaj entuziasme babilis uzante la Esperantajn vortojn kiujn li jam regas. Alan Mendelawitz alvenis de Albany sur sia belega motorciklo, kaj ni ĝuis la partoprenon de, inter aliaj, Galina Sliwa, kiun ni nun ne ofte vidas pro malsano.

Post vigla konversacio kaj iom

La enigmo proponita de Henry Broadbent ne solviĝis, eble pro tio ke la programo estis sufiĉe riĉa. Sed venos alia jaro, ĉu ne? □

tro da manĝaĵo, kiel kutime, ni okazigis scio-konkurson en 2 partoj — ĝenerala scio kaj esperantologiaj demandoj. Oni faris la konkurson (kiu fakte estis pli amuzigaĵo ol konkurso) en paroj kaj ĝi estis prezentita en sufiĉe facila Esperanto por ke ankaŭ la komencantoj povu bone kompreni la demandojn. Okazis multe da diskuto kaj pensado, sed finfine la gajnintoj estis la teamo de Shirley Gradussov kaj Julian. Ilia premio estas famo kaj gloro do, jen la premio — agnosko por intelekta supereco en Esperanto sub la Suda Kruco!! □



## • Interrete

### Atentu viajn respondojn

Kiam vi respondas al mesaĝo en ret-diskutolisto, ĉu vi simple klakas sur “respondo” kaj forgesas elviŝi la multajn liniojn kiuj estis en la originala mesaĝo?

Kiam oni volas kontribui al diskutaraj “listoj” interretaj, plejofte oni tajpas sian propran komenton, sed forgesas forviŝi la tekstojn de la antaŭaj komentintoj. En preskaŭ ĉiu diskutlisto tio okazas...kaj rezulte, la individuaj komentoj de partoprenantoj en la diskuto estas akompanataj de ofte centoj da linioj kiuj nur ripetas la komentojn (jam

legitajn) de ĉiuj aliaj. Ofte malfacilas, kiam oni legas, trovi la novan kontribuon, pro la multego da senutilaj ripetaĵoj.

Ĉu vere estas tiom malfacile simple forviŝi alies liniojn da teksto, kiam oni tajpas la propran komenton? Certe ĝentileco postulas tion — kaj la legantoj de la diskuto ne trovas neceson konstante trarigardi centojn da jam legitaj linioj por trovi la komentojn de la nova komentinto.

Ankaŭ tio ofte okazas en epostaĵoj. Kiel tio okazas?

Nu, epoŝtaj programoj havas ne nur adreslokone en kiu oni tajpu la adreson de la ricevonto, sed ankaŭ alian adreslokone en kiu oni tajpu la adresojn de aliaj personoj kiuj ricevu kopion de la mesaĝo.

Sed multaj personoj — inter ili, mi mem — ofte senzorge tajpas ĉiujn adresojn en la unuan adreslokone. Do kiam leginto premas la “respondu”-butonon, ŝi/li senpripren-

se sendas sian respondon al *ĉiuj*, kvankam la respondo efektive estis intencita nur por mi.

La solvo estas evidenta: tajpu en la adresloko la adreson de nur unu persono, kaj en la kopioj-adresloko la adresojn de la aliaj personoj al kiuj vi volas sendi la mesaĝon porinforme, sed de kiuj oni ne specife volas respondojn. — ☐

.....  
**Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto** peras korespondadon inter japanaj kaj eksterlandaj korespond-dezirantoj. Ni petas vin anonci al viaj membroj pri nia servo jene:

Se vi interesiĝas pri korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al  
Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto  
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3  
Tokio, Japanio

Skribante al ni korespondo-peton, bonvolu aldoni viajn aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn, por faciligi nia laboron. ☐

.....  

## SBS pri Esperanto

En la komenco de januaro, la radio-dissendo de SBS inkluzivis 9-minutan programeron, registritan dum la Zamenhof-festo en Sidnejo. La intervjuisto parolis (anglalingve) kun pluraj esperantistoj pri kial kaj kiel ili uzas Esperanton. Estis bone aŭdi la voĉojn de diversaj esperantistaj sidnejanaj, kiuj tre entuziasmis pri Esperanto. La retadreso de la registraĵo estas <http://www9.sbs.com.au/radio/index.php?page=vv&newsID=148013>. Je la 8a de februaro ĝi ankoraŭ estis aŭskultebla ĉe tiu retadreso. — ☐



## • Skribas la legantoj


**Donald Rogers skribis:**

En *ENK* numero 84 (p, 10) vi menciis tri programojn. Dankon pro tio. Pro via instigo mi elŝutis kaj iomete provis la programon “Esperantoe-dit”. Mi rimarkis ke la programo nomas sin “Esperantilo”. Mi ne multe uzas ĝin. Pleje mi ankoraŭ

uzas je OpenOffice.org.

Mi jam uzas je “Scribus”, do mi volas atentigi vin ke ĝi estas uzebla ne nur per Macintosh OS X, sed ankaŭ per Linukso (kiel ĉe mi) kaj per MS Windows. Kaj ĝia retejo troviĝas ĉe [www.scribus.net](http://www.scribus.net). La ...com

estas senutila indekso kaj vendota.

[Mi dankas pro la korektoj. — 

### **Geraldo Mattos** [Prezidanto de la Akademio de Esperanto] **skribis:**

Mi gratulas pro la agrabla noveleto verkita de Gaye Philips, [*ĜK* 84, novembro-decembro 2006, p. 7-10], kies fino estas vere surpriza. Sola kritiketo: pli bone estus *alveni en loko* ol *alveni en lokon*... Ni preferu akuzativon ĉiam, kiam temas pri la loko de la ago: mi kuras sur la strato [la strato estas la loko de la kuro] / mi kuras sur la straton [mi ne kuras sur la strato, sed al la strato]... La loko de la alveno restu do en la pli simpla nominativo!

Kaj ŝajne tian gratulon mi ne povas etendi al la interesa artikolo, kiun prezentas Marcel Leereveld en la p. 3-5. Mi legis tie du neologismajn verbojn, kiujn neniu rajtas kritiki, ĉar kvankam ege malofte uzataj ili estas bone derivitaj vortoj: *okupatis*, en la unua kolumno, kaj *instruatis*, en la dua kolumno, ambaŭ en la sama p. 3.

Tute diferenca estas laŭ mi la sorto de la tria okazo de alia simila vortokonstruo: *konstruatis*. Jen parto de la frazo, en kiu tiu formo aperas:

### **Hugh Malcolm skribis:**

...there was an unfortunate typo in my email address in the latest *ĜK*. Enquiries about the AEA library collection (in its boxes in the sw-

### **Erhard Claus skribis:**

Mi ĉeestis Esperantajn klasojn en Brisbano antaŭ nelonge, kie la vigla Igor Couto kaj la mirinda Miranda Lutz estis niaj geinstruistoj.

Dum la lernado ni devis inter-

— La domo *konstruatis* en 1904, kaj en ĝi loĝis loke historia F-ino Sofia Giles [...].


La *Fundamento de Esperanto* lekcias, ke la vorto *konstruata* indikas ion dum ni ĝin *konstruis*, *konstruas* aŭ *konstruos* [mia kursivo]:


“Kiam via domo estis *konstruata*, mia domo estis jam longe konstruita” [Ekzercaro 25:21].

Sekve de tio, leginte la supran frazon, mi tuje demandis min admire: Kial ŝi ne timis loĝi en konstruata domo?

La verbo *konstruati* povas esti mallongigo sole nur de la esprimo *esti konstruata*, eventuale *resti konstruata*, kaj neniam de la esprimo *esti konstruita*...

La ekzemplo estas lamentinda reveno al la tempo de la Atismo, por kiu la frazo “la domo estis konstruata” parolis pri konstruita domo.

[Mi dankas pro la korektoj. Pri “*konstruatis*” mi longe diskutis kun Marcel, kiu argumentas ke -ati estas ĝenerala pasivo, kaj ne tempindiko — 

itchboard room at the Australian Institute of International Affairs) should contact: [huighm@gmail.com](mailto:huighm@gmail.com) (not ‘hughm’) 

vjuj unu la alian. Dum ĉi tiu parolado mi demandas iun virinon: “Kio estas via profesio?” Ŝi respondis: “mi estas instruisto.” Suprizite mi diris: “vi estas virino. Kial vi ne res-

pondas per la vorto instruistino?” Ŝi diris, ke la vorto instruisto difinis la profesion, dum la vorto instruistino difinas ion privatan, personan.

Mi kredas, ke Zamenhof prenis la sufikso *in* el la germana lingvo, kie estas akraj distingoj inter viraj kaj inaj profesiaj titoloj kiel *Doktor* kaj *Doktorin*, *Minister* – *Ministerin*, *Professor* – *Professorin*, *Student* – *Studentin*. Ĉi tiuj estas germanaj vortoj.

Ĉu Esperanto marŝas laŭ la Usona vojo, kie ĉiu *actress* volas esti

sciata kiel *actor* kaj virinoj volas iĝi *president*, ne *presidentress*. En Aŭstralio virinoj eĉ alprenas la viran titolon *Lord Mayor* ne *Lady Mayoress*. Estas perforta uzo de la lingvo!

Se iu instruistino ne volas malkaŝi sian genron, kiam ŝi estas demandata: “kio estas via profesio,” ŝi povus diri, “mi estas membro de la instrua profesio”; sed diri: “Mi estas instruisto,” estas ja malĝusta, ĉar la vorto “instruisto” estas vira vorto. Ĉu vi havas opinion pri tio?

*[La virino en via klaso pravis. En multaj lingvoj, ne nur en Esperanto, ordinaraj substantivoj ne indikas la sekson. -in- venis ne el la germana lingvo, sed origine el la latina, kaj estas familiara sufikso tra la tuta Eŭropa lingvaro. En Esperanto, oni kutime indikas la sekson nur se estas speciala kialo por tio. Plena Analiza Gramatiko, de Kalocsay kaj Waringhien, komentas: “oni uzas la simplan formon, se temas indifereinte pri viroj aŭ inoj...[ekzemple:] en la ligo la virinoj povas fariĝi oficistoj egale kiel la viroj.” Mi konsilas legi la koncernan detalan pritrakton de tiu temo en Bertil Wennergren: Plena Manlibro de la Gramatiko de Esperanto. — [db]*

**Alan Turvey skribis** (pri la artikolo “Historio pri la rolo de teknikaĵoj en Esperanto en Aŭstralio” [*ESK* #84, nov-dec.2006] de Terry Manley):

The first web page was created by me probably about 1991 — that was when I came back from Japan and just after I became secretary of AEA (you can check this date) and I remember being concerned about ensuring we had the name reserved.

The first page was created in Esperanto using ‘x’s as that was before unicode was popular. It was then changed to two languages — Esperanto and English as I realized that more English speakers saw the web page than Esperantists. John Gallagher took over and the site became more colorful but again in Esperanto only. However I think he

used Unicode which enabled some people to see Esperanto text correctly.

Ralph originally contributed some money (2 or 3 hundred which went towards hosting the web site.) Alan continued making payments after that until AEA contributed \$300. The hosting cost was reduced to zero for a while as AEA was treated by Zip as a charity, but then after it was taken over by Pacific Internet the \$300 contributed by AEA was eventually used at about the same time Igor took over active maintenance and established our hosting with a different company. □



# Raporto de la komisiisto pri ekzamenoj

Marcel Leereveld

prezentita al la Jarkunveno de AEA en Hobarto

Jam en 2005 la nuna Prezidanto atentigis min, ke laŭ la statuto, AEA respondecas pri la organizado de Kursaroj en Aŭstralio.

Pro tio, la Estraro de AEA decidis en januaro 2006 (ĉe Tathra) nomi min Komisiito por Kursaroj. Konsekvence mi en februaro flugis al Hobarto por renkonti tie la lokan esperantiston Robert Budzul, por kune serĉi la plej taŭgan ejon por okazigi la januaro-2007-an somerkursaron tie.

Evidentiĝis ke en tuta Hobarto, krom la multekostega Wrest Point Hotel, ekzistis nur unu loko havebla por ni: la Kolegioj de la Universitato. Mi provizore traktis kun la universitata respondeculo, kaj bezonis tempon por negoci la plej taŭgajn kondiĉojn. Ĉar Robert tiutempe ne havis tempon por helpi min, mi devis fari tiujn esploron kaj negocadon sola.

Pri la nombro da litoj, mi decidis bazante min sur antaŭaj somerkursaroj. En majo mi findecidis pri ĉio, malgraŭ la neankoraŭa helpo de Robert, ĉar la broŝuroj devis esti pretaj por la sekvonta *EN*. Mi subskribis la kontrakton je la 9a de majo 2006.

